

**Interlingvistikaj Studoj, UAM, 2015/2**

**Esperanta Interlingvistiko 3**

Laboraĵo por Michael Farris

Dato: 31a de oktobro 2015

**Nomo de la studento: Johan Derks**

## **Nomado de parencoj en slavaj lingvoj**

### **Enhavo**

1. Unulinia gefiliĝo.....	2
2. Ses manieroj de parenenomado por sistemoj kun ne-unulinia gefiliĝo .....	3
3. Parenenomado por duflanka gefiliĝo, la kazo de dek unu slavaj lingvoj .....	5
la gepatra generacio de memo.....	5
la generacio de memo, kuzoj kaj kuzinoj plus genevoj.....	6
la boparencoj. ....	7
4. Resumo. De kie venas tiuj diferencoj en specifado de parencomoj? .....	8
Referencoj.....	8

## 1. Unulinia gefiliĝo


Ekzistas du principoj, kiuj kaŭzas la konsistadon de parenceco: gefiliĝo<sup>1</sup> kaj afinemo<sup>2</sup>.

Gefiliĝo indikas la generan devenon de viro kaj virino, kutime kiel gepatroj. Afinemo estas la kvalito de kombineblo inter homoj, kiu estas bazita sur (ĉeno de gefilecaj/gepatrecaj rilatoj kaj) geedzeco.

Homoj kiuj estas interligitaj pro parenceco formas parenmgrupojn, kies konsisto kaj interna strukturo estas prezentbla helpe de genealogia arbo, en kiu prezentiĝas jenaj simboloj:

= por geedziĝa rilato, ▲ por viro, ● por virino, | por genereco, — por samdeveno.

Ne ĉiuj personoj prezentitaj en la genealogia arbo apartenas al la parenmgrupo kaj la intenseco de la ligo kiun ili havas kun la centra persono en la arbo (“memo”) varias de maksimumo al nulo.




Ni komencu per la plej baza parenmgrupo, la kernfamilio aŭ generujo.<sup>3</sup>

Kiom etendita estas la familio en pli vasta senco, estas pli-malpli kulture difinita.

Ĝis la dudeka jarcento 60% de ĉiuj socioj retrokalkulis sian devenon unulinie. Konataj estas patrolinia kaj matrolinia deveno. Poste multaj el tiuj societoj malaperis aŭ estis absorbitaj de pli grandaj socioj kiuj sekvis aliajn regulojn de deveno.

Vidu jenan ŝemon de trigeneracia matroliniaĝo:



1. membroj de unuliniaĝo de Novgvineo

Kvankam mi ne havas informojn pri tio, oni povas imagi, ke nur la membroj de la propra linio portis specifan parenconomon. Tamen ekster la unuliniaĝo ekzistis pli ampleksaj strukturoj de klanoj, enkorpigataj en medietoj<sup>4</sup> aŭ fratrio<sup>5</sup>.

<sup>1</sup> *Deveno* estas tro ĝenerala vorto por descent/ancestry (en), descende/ascendance (fr), Abstammung/Abstieg, родословная/опускание (ru). Mi elektis tradukon Esperanten konforme al *filiation*.

<sup>2</sup> affinity (en), Affinität (de), сродство (ru), affinité (fr)

<sup>3</sup> Por ekhavi klarajn mallongigojn mi uzas (la unuajn du literojn de) la alternativajn inajn parenccvortojn, proponitajn de Cyril Brosch (Vidu en lingvakritiko.com): *matro* (patrino), *ŝestro* (fratino), *Memo* havas nekonatan sekson kaj estas uzata anstataŭ la internacie konata *ego*.

<sup>4</sup> moiety, de franca moitié, de latina medietas, vidu <https://de.wikipedia.org/wiki/Moiety>

<sup>5</sup> φρατρία, vidu I Samuel 10, 19, kie ĝi tradukiĝas al *familioj*.


## 2. Ses manieroj de parencomado por sistemoj kun ne-unulinia gefiliĝo

Krom unulinia deveno ekzistas sistemo de socie rekonata duflanka deveno<sup>6</sup>, kiu permesas homojn esti parto de la etendita familio de sia edzo tiel kiel de sia.


Supozeble ekzistas rilato inter la demando, ĉu iu parencomospeco apartenas al la parencomgrupo de memo kaj ĉu ĝi havas lin koncernantan individuan parencomon.

Antropologoj konkludis, ke ekzistas en la mondo ses bazaj ŝablonspecoj por nomi siajn parencojn, nomataj laŭ jenaj popoloj: Eskimoj, Havajanoj, Sudananoj, Omahanoj<sup>7</sup>, Korvanoj<sup>8</sup> kaj Irokanoj<sup>9</sup>.

La plej komuna sistemo en Usono kaj Eŭropo nuntempe estas la **eskima sistemo**<sup>10</sup>:



La matro- kaj patroflankaj parencoj de memo estas konsiderataj same gravaj, neniuj distingo estas farata inter parencoj ĉe la matra kaj patra flankoj de la familio. Ĉi tio reflektiĝas en la parencomoj: onklo (4), onklino (3), kuzo (7), kuzino (8) (ne indikitaj avo, avino, nepo, nepino). Preskaŭ la kontraŭo de tiu sistemo, en kiu la generacio okupas lokon super ĉiuj aliaj parenrilatoj, estas la **havaja sistemo**:



Ne ekzistas diferenco laŭ parencomoj inter frato kaj kuzo, inter fratino kaj kuzino, eĉ ne inter patro kaj onklo, patrino kaj onklino.

La havaja sistemo kun emfazo al horizontala parenceco ofte iras kun **ambaŭlinia gefiliĝo**, unu el la kvar formoj de duflanka gefiliĝo (vidu piednoton 6). Oni povus nomi ĝin ankaŭ “preferlinia” gefiliĝo, ĉar ĝi permesas homojn ĝustigi sin al ŝanĝiĝanta familia situacio. Ekzemple, kiam iu prenis virinon el politike aŭ ekonomie pli grava familio, li akceptos ke liaj infanoj identiĝu kun la

<sup>6</sup> genera (“cognate descent”, en) gefiliĝo, distingebla en dulinia, ambaŭlinia, paralela kaj duflanka gefiliĝo


<sup>7</sup> indiana tribo “Omaha” (en) en ŝtato Nebrasko de Usono

<sup>8</sup> indiana tribo “Crow” (korvo, en) en ŝtato Montano de Usono


<sup>9</sup> indiana tribo “Iroquois” (fr) origine loĝanta sud-oriente de Eria kaj Ontario Lagoj.

<sup>10</sup> Oportunas noti, ke ĉe la blanka lasitaj simboloj kaŝiĝas pliaj dimensioj de familie rilataj personoj, kies parenceco funkcias tra iliaj gefratoj al la gefiloj de la simboligita persono. Tiel ĉiu ano de la malsupra generacio partoprenas en la gekuzfrataro tra siaj samsangaj geonkloj.

patrina famililinio por plibonigi siajn perspektivojn kaj statuson ene de la socio:



Sufiĉe maloftaj estas la sistemoj de dulinia kaj paralela gefiliĝo. Kiu estas viaj pragepatroj montras en la okazo de **dulinia gefiliĝo** la suba diagramo:




La ina kaj malina memoj malsupre parencas vertikale kun siaj gepatroj kun iliaj samsanguloj, kun la avo tra la patro kaj la avino tra la matro, ambaŭ kun ties samsanguloj, kun la patro de la avo kaj la matro de la avino kun ties samsanguloj ktp.

Laŭ **paralela gefiliĝo** ĉiu vira memo rekonas socie kiel siajn praulojn la patron, la avon tra la patro, la patron de tiu avo ktp., simile ina memo kalkulas al sia deventgrupo la matron, la avinon tra matro, la matro de tiu avino ktp.

Kulturoj kun dulinia kaj paralela gefiliĝoj estas karakterizataj de fore retroetendita memorado pri sia prauloj.<sup>11</sup>

Ofte la eskima centreco de la generujo iras kun principo de **duflanka gefiliĝo**<sup>12</sup>, t.e. socie rekonataj parencoj estas gepatroj kun ties samsangaj gefratoj (eventuale ankaŭ ties partneroj), geavoj kun ties samsangaj gefratoj (eventuale ankaŭ ties partneroj) ktp. Tiu tipo do enhavas multajn oblikvajjn (al onkloj kaj onklinoj) kaj vertikalajn ligojn (al gepatroj, geavoj ktp).



La eskima emfazo al la generujo (kernfamilio) kaj ties generacia hierarĥio disponas al diferenciga nomado de la parenrilatoj. Tio en kontrasto kun ekzemple la havaja sistemo.

<sup>11</sup> Mi ŝuldas tiujn ĉi kaj multajn aliajn informojn al la artikolo en [http://anthro.palomar.edu/kinship/kinship\\_1.htm](http://anthro.palomar.edu/kinship/kinship_1.htm).

<sup>12</sup> bilateral descent

### 3. Parencomado por duflanka gefiliĝo, la kazo de dek unu slavaj lingvoj

Interne de la kulturlingvujoj, kie regas la principo de duflanka gefiliĝo, oni tamen renkontas notindajn diferencojn.

Kiel konanto de la franca, angla, germana kaj nederlanda, sed novico pri la serba lingvo, min speciale interesas la diferenco en specifeco de nomoj por boparencoj de la slavaj lingvoj inter si kaj kun la angla. La parencojn de memo ekster la generujo kiujn la angla distingas per aparta vorto estas dek unu<sup>13</sup>. En la plimulto de slavaj lingvoj la nombro de distingataj parencoj estas multe pli granda. De kio venas tiu diferenco?

El <http://www.omniglot.com/language/kinship/slavic.htm><sup>14</sup> mi prenis informojn pri parencaj terminoj en dek unu slavaj lingvoj.


#### la gepatra generacio de memo

lingvoj	bulgara	pola	rusa	serba	kroata	ukraina	ĉeĥa	makedona	slovaka	belarusa	slovena
onklo	4	2	1	3	3	2	1	2	1	1	2
onklino	4	3	1	3	3	1	1	1	1	1	3
kune	8	5	2	6	6	3	2	3	2	2	5

Ni ekstraktos nun la respektivajn generaciojn rilate al memo.

Pri la nomoj de praav(in)oj kaj av(in)oj mi notis en la interreto specifajn nomojn pri tio, ĉu ili estas de patra aŭ matra flanko.

Ekzistas maksimume po kvar specoj de onkloj kaj onklinoj, nome ĉu tra patro aŭ matro kaj ĉu samsanga (1) aŭ traedzeca (2).



La lingvoj bulgara, pola kaj serba markas preskaŭ ĉiujn specojn complete. Jen iliaj nomoj:

	tra patro		tra matro		tra patro		tra matro	
	onklo 1	onklino 2	onklo1	onklino 2	onklino 1	onklo 2	onklino 1	onklo 2
bulgara	чичо	стрин(к)а	вуйчо	вуйна	леля	калеко	тетка	тетинчо
pola	<i>stryj</i>	<i>stryjenka</i>	<i>wuj</i>	<i>wujenka</i>	<i>ciotka</i>	<i>stryj</i>	<i>ciotka</i>	<i>wuj</i>
serba	<i>stric</i>	<i>strina</i>	<i>ujak</i>	<i>ujna</i>	<i>tetka</i>	<i>teĉa</i>	<i>tetka</i>	<i>teĉa</i>
kroata	<i>stric</i>	<i>strina</i>	<i>ujak</i>	<i>ujna</i>	<i>tetka</i>	<i>tetak</i>	<i>tetka</i>	<i>tetak</i>

<sup>13</sup> uncle, aunt, cousin, nephew, niece, father-in-law, mother-in-law, brother-in-law, sister-in-law, grandson, granddaughter.

<sup>14</sup> Al la du nomoj por (samsanga) onklo en la kroata, tie raportita – *stric* kaj *ujak* - mi aldonis la raportitajn kiel serbajn *tetak* (edzo de tetka) kaj al la nura nomo por (samsanga) onklino *tetka* la nomojn por traedzaj parencoj *strina* kaj *ujna*. Inverse mi aldonis al la “serba” la nomojn por raportitaj kiel kroataj *bratanac*, *bratanica* (genevoj tra frato) kaj *sestriĉ*, *sestriĉina* (genevoj tra ŝestro).

Homonimoj, kompare kun la bulgara nomaro, estas presitaj kursive. Oni rimarkas, ke en la pola, kroata kaj serba oni ne distingas inter ŝestro de patro kaj ŝestro de matro (*ciotka/tetka*). Por iliaj edzoj la serba rezervas la nomon *teĉa* aŭ *tetak*, dum la pola samnomas ilin ol la onklo tra respektive patro (*stryj*) kaj matro (*wuj*).

La makedona kaj ukraina<sup>15</sup> lingvoj distingas nur inter la onkloj de patra flanko kaj de matra flanko, dum belorusa, ĉeĥa, rusa, slovaka kaj slovena konas nur po unu vorto por onklo kaj onklino: дзядзька, стрўс, дядя, стрўко, stric, respektive цётка, teta, тётя, teta, teta.

### la generacio de memo, kuzoj kaj kuzinoj plus genevoj

La kroata kaj serba ambaŭ uzas *rođak, rođak(inj)a* sendepende de la speco de onkl(in)o, kiu generis ĝin. Tiu vorto ankaŭ havas la ĝeneralan signifon de parenco. Sed en la serba (ankaŭ en la kroata?) oni facile uzas la esprimojn *brat/sestra od tetke/strical/ujaka*<sup>16</sup>. Analogan sistemon konas la pola lingvo, sed la pre-pozician suplementon anstataŭas adjektiva epiteto: *ciotka* (samsanga onklino) → *brat cioteczna, stryj* (patrofrato) → *brat stryjeczny, wuj* (matrofrato) → *brat wujeczny* kaj analoge por *siostra*.

Kiel pri la slovena, kie mia fonto mencias nur *bratranec* kaj ne *sesternica*, kiel en la slovaka?

Kiel elsaviĝas la belorusoj, kiuj laŭ la fonto nur havas стрўечны брат? Ĉu ili prunteprenis tion el la pola? Стры не troviĝas inter la belorusaj parencomoj, sed pole ĝi signifas onklo kaj ekzistas *brat stryjeczny*. Ni supozu, ke ili distingas inter kuzo kaj kuzino.

En la bulgara, ĉeĥa, makedona, rusa, slovaka kaj ukraina oni uzas du nomojn, unu por kuzo kaj ties ingenrigitan por kuzino. Ni alkalkulas al tio ankaŭ la slovenan kaj belorusan.

Krome en la polan eniris pruntvortoj *kuzyn, kuzynka*.

Ni traktu la sekvantan generacion kun vortoj por nevo kaj nevinoj.

Unu grupon formas la belorusa, bulgara, rusa kaj ukraina kun пляменнік/ пляменніца kaj ties variantoj. Por ĉeĥoj, slovakoj, slovenoj kaj makedonoj same sufiĉas unu vortoparo<sup>17</sup>, sed la kroata-serba kaj pola distingas po du vortoj por nevo kaj nevino: *bratanac/bratanica, bratanek/bratanica* (filo/filino de frato), *sestrić/sestričina, siostrzeniec/siostrzenica* (filo/filino de fratino).

Krom tio en kroata-serba ankaŭ *nećak-nećak(inj)a* estas uzata.

Por la du parenctipoj, gekuzoj kaj genevoj rezultas suba tabelo de nombroj de distingoj.

<sup>15</sup> чичко, вујко respektive стрій, вуј(ко)


<sup>16</sup> Mi preferas ne kalkuli ilin kiel apartajn nomojn, pli kiel priskriban specifigon. Traduko estas “frato/fratino tra patr(in)ofratino/patrofrato/patrinfrato”. Evidente oni ne povas ĉi tie traduki *od* per Esperanta *de*.

<sup>17</sup> synovec/neteř, synovec/neter, nećak/nećaka, внук/внука

lingvoj	bulgara	pola	rusa	serba	kroata	ukraina	ĉeĥa	makedona	slovaka	belarusa	slovena
gekuzoj	2	6	2	2	2	2	2	2	2	2	2
genevoj	2	4	2	4	4	2	2	2	2	2	2
kune	4	10	4	6	6	4	4	4	4	4	4

### la boparencoj.

La multecon de eblaj rilatoj bone montras la nomaro en la serba. (Mia fonto nur mencias *zet* kaj *snaha* aŭ *snaja* por la kroata lingvo. Mankas al mi konfirmo pri tio.).



Pretendiĝas, ke do memo havas kvar specojn de samgeneraciaj boparencoj, sed en la rusa, la serba-kroata kaj eble aliaj slavaj lingvoj<sup>18</sup> oni havas apartan nomon por bofrato per geedziĝo, ekzemple, rusa virino povas diri al la edzo de sia fratino зять (zjat'). Al la edzino de sia fratino невестка (nevestka). Kroata virino povas diri *zet* kaj *snaha*. Do por tiuj lingvoj ekzistas kvar (por edza memo) + kvar (por edzina memo) + du (pro geedziĝo de frato aŭ fratino)<sup>19</sup> = dek malsamaj nomoj por samgeneraciaj boparencoj.

En Esperanto oni diras *bofrato* kaj por frato de sia edz(in)o kaj por edzo de sia fratino.

Ŝajnas, ke ankaŭ la vortoj *швагер* (ŝvahier, belaruse), *švagr* (ĉeĥe), *szwagier* (pole), *švavor* (slovake) kaj *svak* (slovene), derivitaj de la germana *Schwager*, havas ambaŭ signifojn.<sup>20</sup>

Superrigardon de la nombro de specifaj vortoj por boparencoj donas suba tabelo.<sup>21</sup>

lingvoj	bulgara	pola	rusa	serba	kroata	ukraina	ĉeĥa	makedona	slovaka <sup>22</sup>	belarusa	slovena
samgener.	6	2	7	10	8	2	2	3	3	2	2
bogefiloj <sup>23</sup>	2	2	<b>1</b>	<b>0</b>	<b>0</b>	3	2	2	2	4	2
bogepatroj	4	2	4	4	3	2	2	2	2	2	2
kune	12	6	12	14	11	7	6	7	7	8	6

<sup>18</sup> Pri pergeedziĝaj nomoj la retpaĝo [www.omniglot.com/language/kinship/slavic.htm](http://www.omniglot.com/language/kinship/slavic.htm), kiu servas al mi kiel fonto, montriĝas esti tre malsufiĉa kaj erara. Korektoj kun fontindikoj de legantoj estas bonvenaj.

<sup>19</sup> La signifoj de *zet*, *snaha* kaj ekvivalentoj en aliaj slavaj lingvoj estas pli vastaj. Interalie ili uzatas por bofil(in)o.


<sup>20</sup> Tio puzlas min, ĉar ĉu ne estas tiel, ke frato de edzino ĝenerale estas pli proksima ol edzo de fratino? Kaj fratino de edzo pli proksima ol edzino de frato? Kial oni ne faras distingon kiel en la rusa kaj (kiuj?) sudslavaj lingvoj?

<sup>21</sup> el [www.omniglot.com/language/kinship/slavic.htm](http://www.omniglot.com/language/kinship/slavic.htm) kun plioj el Google Translate; samgener. = samgeneraciaj

<sup>22</sup> sesternice ≠ ŝvagrina ?

<sup>23</sup> Vortoj kiuj, laŭ mia informo, jam estas uzataj ankaŭ por fratedzino kaj fratinedzo (*zet*, *snaha*, *snaja*, невестка) ne estas enkalkulitaj denove ĉi tie.

Ne tiom konata estas la kuntaŭga nomaro por samgeneraciaj boparencoj en Esperanto:



Mankas nur apartaj vortoj por edzino de frato kaj edzo de fratino. Simpla alternativo de *bofrat(in)o* estas *fratedzino* kaj *fratinedzo*. Krom tio oni povus konsideri *ŝvagr(in)o*.

Se oni aldonus Esperanton en la supra tabelo, ĝi atingus la nombrojn 6, 2, 2 por respektive samgeneraciaj boparencoj, bogefiloj kaj bogepatroj.

#### 4. Resumo. De kie venas tiuj diferencoj en specifado de parencomoj?

Kolektante la sumojn por la slavaj lingvoj de la gepatra generacio, la gekuzoj kaj genevoj kaj la boparencoj, oni ekhavas jenan resumon:

lingvoj	bulgara	pola	rusa	serba	kroata	ukraina	ĉeĥa	makedona	slovaka <sup>24</sup>	belarusa	slovena
geonkloj	8	5	2	6	6	3	2	3	2	2	5
gekuzoj/genevoj	4	10	4	6	6	4	4	4	4	4	4
boparencoj	12	6	12	14	11	7	6	7	7	8	6
<b>totalo</b>	<b>24</b>	<b>21</b>	<b>18</b>	<b>26</b>	<b>23</b>	<b>14</b>	<b>12</b>	<b>14</b>	<b>13</b>	<b>14</b>	<b>15</b>

Kiom tiuj nombroj estas fidindaj – kaj certe ili tiaj nur estas parte kaj eble mi estas influata pro pli kompleta informado pri la serba lingvo – kun tiu verŝajno oni povas aserti, ke la lingvoj kroata-serba, bulgara, pola kaj rusa havas pli detaligitan terminaron por parencoj ol la ukraina, ĉeĥa, makedona, slovaka, belarusa kaj slovena. Tiu dudividiĝo ne sekvas iun geografian kriterion. Se ĝi estas ĝusta, ĝi povus rilati miaopinie al pli malnova religia kulturo de poloj kaj rusoj kaj la plurjarcenta konservado de balkanaj kulturoj izolitaj de la turkaj okupantoj. Tiuj faktoroj povas esti la kaŭzoj de pli enradikigita hierarĥia parenmgrupa sistemo, en kiu ĉies rolo estas difinita, inter ili speciale la roldivido inter viroj kaj virinoj.

#### Referencoj

[http://anthro.palomar.edu/kinship/kinship\\_1.htm](http://anthro.palomar.edu/kinship/kinship_1.htm) ĝis [http://anthro.palomar.edu/kinship/kinship\\_6.htm](http://anthro.palomar.edu/kinship/kinship_6.htm)  
<https://de.wikipedia.org/wiki/Moiety>  
<http://www.omniglot.com/language/kinship/slavic.htm>

<sup>24</sup> sesternice ≠ ŝvagrina ?